The collection now contains 167 books of the larger sort, renting separately; 111 smaller books arranged in 37 triads; and 275 booklets in 55 groups.

A noteworthy evidence as to the value and interest of Esperanto literature may be seen in the fact that the Rental Service has one user who drew his one hundredth book or group-envelope more than four months ago, and still is going strong! Although this one reader stands quite alone, there are fifteen others who have drawn somewhere from one dozen to four dozen books each. The value of the service is not measured by these heavier readers alone. Those who have drawn only half a dozen books, of even a couple, have measurably expanded their cultural horizons.

It is still possible to receive and handle a number of additional registrants.

—E. G. D.

PAC-PLANOJ “LAŬ LA KARTO”

(Peace Plans à la Carte)

EDITH WYNNER

Ĉi tiu artikolo estis originale presita angle, en la gazeto *Common Sense*, Junio 1944, sub la titolo *Peace Plans à la Carte*. F. A. Post-nikov iniciatis la Esperanto-tradukon. A. E. Regal kaj La Redaktisto kunlaboris. Edith Wynner estas kunaŭtoro kun Georgia Lloyd de la libro *Searchlight on Peace Plans*, elstara analizo de proponoj pasintaj kaj nuntempaj por mond-organizado. La libro estas eldonita de E. P. Dutton (\$5).

Planado de postmilita mond-organizo estas la ĉefa priokupo hodiaŭ. Preskaŭ ĉiu tion faras, kaj tiuj kiuj jam ne faris, verŝajne baldaŭ faros.

Spertuloj pri politika scienco, registaraj aferoj kaj historio, efektive estas en la malplimulto inter la planistoj. Tio ne estas tro surpriziga. Spertulo estas *detalisto*. Estas lia tasko lerni pli kaj pli multe pri malpli kaj malpli da aferoj. Havi la mult-ampleksan vidon estus efektive neprofesie por spertulo. Sed la mult-ampleksa vido estas ĝuste tio, kion pac-planisto devas havi. Li devas envadi tien, kien spertuloj timas enpaŝi; svingi sian programon antaŭ la popolamasoj; igi ilin postuli lian panaceon; kaj devigi spertulojn kuniĝi kun li por prilabori la detalojn. Inter nunaj pac-planistoj estas ĉarpentisto, brig-spertulo, ostro-farmisto kaj aeronautika inĝeniero, kaj ankaŭ diplomatoj kaj praktikantaj politikistoj.

Pac-planado ne komenciĝis ekde Pearl Harbor. Homoj espereme estas provintaj por forigi militadon de post la plej fruaj eksperimentoj pri ŝtata regado. Inter la pli fruaj pac-planistoj estis reĝoj, soldatoj, kardinaloj, monaĥoj, poetoj, metafizikistoj, filozofoj, galerosklavoj, instruistoj, forĝistoj kaj mar-kapitanoj. En nia libro de pac-receptoj — “Serĉlumo sur Pac-Planojn: Elektu Vian Vojon al Mond-Regado” (*Searchlight on Peace Plans: Choose Your Road to World Government*) — Georgia Lloyd kaj mi senŝeligis la esencajn proponojn de centoj da teoriaj planoj ekde la jaro 1306 ĝis la nuna tempo. Kaj la praktika evoluado

de ŝtata regado, de kio la nuna pac-planado estas nur daŭrigo, komenciĝis eĉ antaŭ la skribita kroniko.

Hodiaŭ estas preskaŭ neeble teni klaran scion pri la novaj planoj. — Estas tiel multe da malakordaj voĉoj, tiel multe da forta influ-agado por apartaj planoj, ke nek spertulo nek laiko alvenas al rezulto. La kompatinda laiko sin perdas en la konfuzo. La spertulo aŭ sidas aparte en angulo, absorbata per monto da detaloj kiujn li mem faris, aŭ deklamas siajn komplikajn pensojn antaŭ seriozaj aŭdantaroj kiuj komprenas malmulte de tio kion li diras. Dume la fendo inter la spertulo kaj la homoj kiuj devas voĉdoni fariĝas pli kaj pli larĝa. Ni devas konstrui ponton trans tiu fendego por ke la planistoj kaj la ordinaraj homoj komprenu unu la alian.

La subjekto efektive ne estas tiel komplikita kiel ĝi ŝajnas. Tia ĝenerala kompreno kia estas necesa por decida agado, estas malhelpata per du ekstremoj en prezentado: tro multe da malprecizaj ĝeneralajoj kaj tro multe da etaj detaloj. Tamen la fundamentaj problemoj, la solvo de kiuj estas necesa por baza decido, estas kompare simplaj.

Kiam vi esploras ies planon de mond-organizo, serĉu konkretajn proponojn rilate al la jenaj fundamentaj punktoj: (1) membreco en la internacia organizo; (2) strukturo; (3) metodo de devigado. Malpli gravaj punktoj en la plej multaj planoj priskribas transigon de aŭtoritato, kaj organojn de regado provizantaj leĝan aŭ politik-

farantan, administran kaj juĝan branĉojn de la registaro.

Membreco en la Organizo

La membreca klaŭzo diros kiom de la globo devas esti organizita. Estas tri ebloj:

Universala membreco estas proponita de planisto kiu deziras enhavigi ĉiujn ekde la komenco, Eble lia motivo ne devenas sole de demokrata sento. Li ankaŭ opinias ke paco ne povas daŭri en la sama mondo kiu entenas kaj aron de internuloj kaj aron de eksteruloj.

La *regiona* propono venas de planisto kiu havas inklinojn al geografio. Li volas unuigi naciojn laŭ geografia proksimeco. Tiu planisto ofte argumentas ke estas pli facile unuigi unue najbarojn proksimajn.

La *ideologia* bazo por membreco venas de planisto kiu opinias ke simileco de idealoj, formoj de regado, ekonomia organizado, aŭ religio estas la plej forta ligilo por unueco.

Strukturo de la Organizo


Strukturo, la dua fundamenta punkto, pritraktas pri la maniero laŭ kiu la membroj estos unuigitaj. Denove estas tri ebloj. Dum miljaroj ĉiuj branĉoj de la homa raso eksperimentis je aliancoj, konfederacioj kaj federacioj. Du aliaj tipoj — la unuigita mondŝtato kaj la universala imperio — estas forigitaj el ĉi tiu diskutado. Ilia aplikado postulus mond-diktatorecon.

ALIANCO-STRUKTURO

La *alianco*: Ĉiuspecaj politikaj unuoj diletis je aliancoj kiel asekurado kontraŭ milito, ebla milit-evitilo, aŭ milit-prokrastilo. Kiam la pratempa kavernohomo en sia unua kuna ĉas-ekspedicio — tio estis alianco. Post la ĉaso ili eble kverelis pri divido de la akiraĵo kaj komencis batadi unu la alian — tio daŭras kiel karakteriza eco de aliancoj ĝis la nuna tempo.

Alianco estas formita kiam du aŭ

pli da suverenaj unuoj, aŭ nacioj, subskribas kontrakton promesante efikan helpon, speciale militan, je eventuala atako de unu aŭ pli da suverenaj unuoj, kiuj ne estas en la alianco. Tio estas defenda alianco. Kelkfoje alianco maskiĝas kiel defenda, sed sekreta klaŭzo eble provizas kunagadon en konkerado. La nacioj, kontraŭ kiujn tia konspirado estas direktita, komencas ankaŭ prepari kontraŭstaron per helpo de aliaj. Tiu procedo estas konata kiel la kontraŭ-alianco.



La teorio estas, ke kiam du kontraŭstarantaj aliancoj estas preskaŭ egalfortaj, nek unu nek alia kuraĝos komenci kverelon. Tamen, ĉiu nacio estas devigata maltrankvile observi la temperaturon de la respektiva alianco. Ĉiu penas malfortigi la aliancon de la alia per diplomatio, subaĉeto kaj aliaj formoj de influo. Kromproduktaĵoj de la alianco estas interkruciĝa reto de interkonsentoj pri neatoko, solenaj deklaroj de internacia amo, kaj febra armado.

La plej eta nacia malsaniĝo povas malfortigi unu aliancon sufiĉe por konduki la alian al la opinio ke la oportuna momento por ataki estas alveninta. Kiam militado evidentiĝas, ambaŭ militantaj grupoj penas altiri ĉiujn aliajn naciojn al sia flanko. Ni vidas hodiaŭ la senkompatan premadon de la Akso kaj de la Unuigitaj Nacioj por impliki la lastajn restopecojn de neŭtraleco, speciale Svedujon, Irlandon kaj Turkujon.


Ĉar la alianco estas ĉiam kontraŭ iuj nacioj kaj invitas kontraŭ-aliancon, ĝi estis absoluta malsukceso kiel milit-evitilo. Ĝi alportis tiujn maltrank-

vilajn paŭzojn inter grandaj militoj, kion oni malvere nomis *paco*.

Laŭ sia propra naturo, aliancoj funkcias plejparte sekrete. Traktatoj kiuj kreas aliancojn ofte enhavas konfidenciajn klaŭzojn kiuj estas konataj nur de la plej altaj civilaj kaj militaj ĉefoj. Estas multe da turmentigo hodiaŭ pri sekretaj interkonsentoj kiujn milita oportuneco eble naskis. La popolo ne nur havas nenian rektan kontrolon je aliancoj, sed plejofte nenian scieton pri la kondiĉoj faritaj.

KONFEDERACIO-STRUKTURO

La *konfederacio* estis evoluigita ĉar aliancoj estis nestabilaj kaj neefikaj kiel longedaŭra pac-aparato. Kiel en la alianco, la suverenaj unuoj ankaŭ ne transdonis eĉ iometon de sia aŭtoritato, sed ili almenaŭ interkonsentis sendi delegitojn por preparoli aferojn regule kaj publike. La popoloj fine povis meti la fingron sur ion ekster la naciaj registaroj.



Konfederacio komencas akiri la kurojn, se ne la realecon, de registaro. Ĝi havas centran konsilantaron — ne ankoraŭ leĝdonistaron — sed organizon de la speco "ni-priparolu-aferojn". Simbolo de la juĝa funkcio komencas aperi, pompa sed sen esenca aŭtoritato. La administra funkcio estas zorge retenata de la membro-nacioj; ili retenas la finan decidon pri ĉio kio estas diskutata de la konfederacio. Ili provizas ĝiajn elspezojn el siaj enspezoj, kio faras la konfederacion pensiulo de ĝiaj partoj. Ĝi ne havas sendependan rimedon por devigi ion, kaj dependas je la volo kaj potenco de siaj membro-nacioj por plenumi la rekomendojn de la konfederacio.

Kvankam estas diverseco en la strukturo de la konfederacio, ĉar ĝi reprezentas unu el pluraj stadioj en la evoluo de politikaj aparatoj, tamen estas ĝenerala regulo ke la konfederacio havas malpli da povo ol iu el siaj membroj, al kiuj ĝi povas nur rekomendi kaj de kiuj ĝi tute dependas por agado.

La ordinara origino de konfederacioj, kiel je aliancoj, kuŝas en la bezono por pli efika defendo kontraŭ eblaj malamikaj najbaroj. Sed la konfederacio ofte enkondukas plian funkcion. Ĝiaj membroj penas defendi sin ne nur kontraŭ eblaj miskonduto fare de kun-konfederacioj. Estas **penado** por teni la anojn de konfederacio al iliaj interkonsentoj kaj por malebligi ke disputoj inter ili eksplodu en militadon. Ekzistas iuj aranĝoj por decidi disputojn inter ili per arbitracio aŭ perado. Por devigi obeon, punaj rimedoj, kiel eksigo, ekonomia kontraŭagado kaj kombinita militagado de la aliaj anoj de la konfederacio, estas ofte enmetitaj en kontraktojn de konfederacio.

La Ligo de Nacioj estas bela ekzemplo de ĝenerala konfederacia strukturo. La Internacia Labor-Organizo kaj la nove kreita UNRRA (Administracio de la Unuigitaj Nacioj por Helpo kaj Rekonstruo) estas tipaj de nekunordigitaj internaciaj specialaj organizoj, modelitaj laŭmaniere de konfederacio, jam ekzistantaj kaj ankoraŭ organizotaj. UNRRA havos pli da administra respondeco kaj mono ol iu alia konfederacia organizo iam havis, sed ŝajnas ke ĝi estos malstarigita kiel eble plej baldaŭ.

La malforteco de la konfederacio kuŝas en la deziro de la naciaj registaro-membroj "manĝi sian kukon kaj ankaŭ konservi ĝin". Ili volus havi la sekurecon kiun unueco provizas super la sfero de ilia nacia kompetenteco, sed ili ankaŭ volus reteni plenan

kontrolon pri internaciaj aferoj. Kiam alvenas kriza situacio, la konfederacio prezentas perfektan lecionon pri akuta senefikeco. La kriza situacio, kompreneble, estas kiam unu suvereno trapasas la limojn kaj eniras la teritorion de alia. Tio estas la decidiga provo. Tio estas unu el la ĉefaj eventualoj pro kio kaj aliancoj kaj konfederacioj estas starigitaj, kaj la tempo por ĉiuj bonaj suverenoj veni por helpi sian konfederacionon.

Kiam oni vokas ilin por helpi, la kun-konfederacioj sin ekokupas per rigardado en alia direkto. Kompreneble, ili interkonsiliĝas kaj konvencias kaj ĉirkaŭekuras, kaj eĉ klopodas por apliki tiel drastan rimedon kiel la svingadon de minaca fingro antaŭ la kulpa kolego. Tiu agado okupas multe da tempo, fakte tiel multe ke la pli malforta konfederacio, alinome "la viktimo de atako", estas fine tut-englutita, kaj post tiam preskaŭ ĉiu elias ekĝemo de senŝarĝiĝo. Tio estas la kutima nekrologo de konfederacioj.


En diversaj partoj de la globo je diversaj tempoj, oni vidis ke kvankam la konfederacio estis sendube plibonigo super la alianco, tamen ĝi ankoraŭ ne evitis militadon. Post iom da fuŝriparado je konfederacioj, oni evoluigis pli kompleksan organizon de suverenaj unuoj: la *federacio*.

FEDERACIO-STRUKTURO

La kreado de federacio postulas redividon de aŭtoritato aŭ suvereneco. Estantaj federacioj estas: la Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko (Usono), la Unuigitaj Ŝtatoj de Brazilo, la Unuigitaj Ŝtatoj de Meksiko, la Unuigitaj Ŝtatoj de Venezuelo, la Argentina Nacio, la Aŭtonoma Ŝtato de Aŭstralio, la Aŭtonoma Regno de Kanado, la Unuiĝo de Sud-Afriko, la Svisa Konfederacio, kaj la Unuiĝo de Socialistaj Sovetaj Respublikoj. Federacio konsistas de almenaŭ tri niveloj de regado — loka, ŝtata kaj federacia. Ili funkcias paralele unu al la alia, inter siaj

respektivaj aŭtoritataj sferoj, traktante senpere kun siaj individuaj civitanoj.

Federacioj malofte estas konstruitaj sur la bazo "eble-mi-kunludos-kaj-eble-ne" kiel je aliancoj kaj konfederacioj.



La decido eniri la federacion estas nedeviga sed, kiam farita, ĝi estas ordinare daŭra. Por malebligi estontajn miskomprenojn kaj artifikojn, la distribuo de povo estas enskribita en koncizan kontrakton, nomita konstitucio. Loka, ŝtata (aŭ nacia) aŭtonomeco (aŭ suvereneco), estas retenita kaj sekurigita. Nova nivelo de regado estas kreita por trakti problemojn kiuj ne estis sufiĉe bone traktitaj de la malpli grandaj suverenaj unuoj. Ĉar la nova organizo de regado devas plenumi aferojn en la sfero asignita al ĝi, tial ĝi estas rajtigita por imposti kaj fari leĝojn senpere aplikeblajn al la individuaj civitanoj de siaj membro-unuoj.

Tiu ĉi estas la esenca milit-evita diferenco inter la konfederacio kaj la federacio. La konfederacio ĉiam estas alvizaĝe je la penado por devigado kontraŭ sia plej granda membro-unuo — la nacio — tial entenanta konstantan minacon de milita devigo. La deviga funkcio de la federacio, male, funkcias kontraŭ sia plej malgranda membro-unuo — la individuo. La individuo povas esti tenata en la rekta kaj mallarĝa vojeto de obeado je la leĝo, per la civila povo de loka, ŝtata kaj federacia regadoj, kiel la polico, la juĝejo, la monpunado kaj la malliberejo.

Federacioj sukcesis krei stabilecon kaj internan pacon inter antaŭe sendependaj unuoj, kiuj estis vaste diverĝaj ekonomie, kulture, lingve kaj rase.

Kvankam konfederacio aŭ disrompiĝas aŭ estas plibonigita en federacian strukturon, federacio povas transformiĝi en unuigitan nacion, sed ĝi malofte reiĝas al sia malunuigita fazo.

Metodo de Devigado

La tria fundamenta punkto koncerne *la metodon de devigado*. En suface granda grado la solvo de tiu problemo dependos je la tipo de strukturo. Komplika konfuzo estas kreita pri la tuta problemo de devigado en la mond-leĝo pro la misuzo de la termino Internacia Policaro. Plejparte ĝiaj proponantoj ne konsideras ĝin kiel policon aganta kontraŭ individuoj, sed kiel militan, marmilitan kaj aermilitan fortojn agantaj kontraŭ nacioj. Ili konsideras internacian devigon nur tiam kiam naciaj armeoj jam sin movas kontraŭleĝe en najbaran teritorion. Ili ne vidas ke internacia devigado, por esti efika kaj sendanĝera por la mondkomunumo, kiel loka kaj nacia devigado estas por la loka kaj la nacia komunumoj, devas esti uzata antaŭ ol tiu *tumult-nivelo* montriĝas. Se loka registaro ne povus haltigi individuan leĝ-rompiston ĝis li jam provokus po-grandan tumulton, loka regado ne estus havinta la longedaŭran, honorindan kaj fortikan vivon kiun ĝi estas ĝuinta. Loke kaj nacie ni akceptis la necesecon kaj saĝecon de limiga kaj evitiga registaro-aŭtoritato funkciaanta super la individuo. Io malpli ol tiu minimumo kiu donas internan pacon, nekredible alportos mond-pacon.

Komprenado pri la tre grava principo de devigado plue nebuliĝis pro la facila milittempa supozo ke la atakanto ĉiam estis kaj ĉiam estos la sama. Ne necesas ke ni rigardu tre longe malantaŭen por malpruvi tiun supozon. Antaŭ nelonge kiam ni malamis la Rusojn kaj amis la Finlandanojn, Rusujo estis elpelita el la Ligo de Nacioj pro atako kontraŭ Finlando. Hodiaŭ Finlando estas tute konfuzita ĉar nun ĝi estas informita ke ĝi partopre-

nas kun Germanujo en atakado, kaj Rusujo estas unu el la pac-amantaj nacioj. Reirante kelkajn jarojn al la tempo de Mond-Milito I, ni trovas ke Japanujo kaj Italujo estis pac-amantaj nacioj, rekompencitaj pro batalado je nia flanko. En la nuna milito, tamen, ili estas la ĉefaj konspirantoj de la Akso-Koalicio kontraŭ ni.

Resumo de la Problemo

Ne mankas profetoj, sed senduba manko de sekvantoj atestas ke la plejmulto de la popolo ne ankoraŭ komprenas la ĉefajn celojn. Iuj planistoj specialigas tute pri membreco en la internacia organizo, iuj pri strukturo; aliaj traktas ekskluzive pri problemoj de devigado; multaj koncerniĝas nur pri detaloj kiel la mona problemoj kaj komunikado. Sed la esenca elekto devos esti farata inter la ĉefaj, tutinkluzivaj proponoj. Por sumigi ilin:

Por-Alianco-Planistoj diras: Ni devas havi fortan aliancon de kelkaj potencaj nacioj, kapablaj kaj pretaj por gardi la pacon, polici la mondon por ĝia propra bono, kaj subigi atakantojn (kun escepto de si mem). Ni ne povas fidi je la malgrandaj nacioj por interkonsenti, kaj krom tio, ili ne estas gravaj de milita vidpunkto. Iuokaze, la mondo ne estas preta por akcepti ion pli ol alianco.

Por-Konfederacio-Planistoj parolas: Aliancoj kaj interkonsentoj por "ekvilibro-de-potenco" ne estas efikaj. Ni devas havi internacian organizon por konstanta konferencado, konsultado, kaj kolektado de teknikaj informoj. Se ni donus al tiu organizo ĝian propran militan povon, ĝi kapablu subigi atakadon. Tiukaze, kredible neniu nacio iel kuraĝus fari atakon. Se la nacioj rifuzus doni al la konfederacio militan povon, kredante ke internacia potenco povus bombi Nov-Jorkon same facile kiel Berlinon, almenaŭ la nacioj kuniĝu en solenaj interkonsentoj por unuigi siajn militajn fortojn kontraŭ iu ajn atakanto. Komprenoble,

estus plĉ bone havi federacion, sed nacioj ne ankoraŭ estas pretaj fordoni sian suverenecon, do ni prenu tion kion ni povas havigi — konfederacion.

Kaj Por-Federacio-Planistoj asertas: Aliancoj kaj konfederacioj ne malebligas militadon. Ili daŭrigas militadon kiel metodon de internacia devigo. La homaro jam spertis iliajn malsukcesojn dum miljaroj de la skribita historio. La nuntempa homo eksperimentis dum pli ol dudek jaroj je konfederacio —

la Ligo de Nacioj. Ni ĉesu eksperimenti plue je memevidentaj malsukcesoj. Ni organizu novan nivelon de regado, donu al ĝi realan aŭtoritaton por pritrakti mond- aferojn, fari mond-leĝojn kaj kolekti monon por efektiviĝi ilin rekte sur nin — la individuaj mond-civitanoj. Ni ĉesu esti tro modestaj, petante la minimumon kiun ni opinias ni povas havigi. Ni komencu postuli tion kion laŭ nia scio ni devas havi.

Sendu al la jena adreso por plua informo pri la mond-federacio-movado: Campaign for World Government, 166 W. Jackson Blvd., Chicago 4, Illinois.

"SUR LA KAMPO —" 1945

SOLDATO D. B. RICHARDSON

Sur la kampo neĝo brilas
Blanke sub la pala lun';
Kie tage ni batalis,
Kelkaj venkis, kelkaj falis,
Regas nokta paco nun.

Bombardado malproksima
Ekruĝiĝas en ĉiel';
Kvazaŭ sango de l' mortintoj
Kaj la ardo de l' venkintoj
Intermiksas en paŝtel'.

Tie staras mi la gardon,
Dum kunuloj en tranĉe'
Dormas pace sur la neĝo;
De mi supren iras preĝo.
Ke la dorm' rompiĝu ne.

Io movas; malamiko?
Haltu, formoj, kiuj ajn!
Kiaj aĵoj tiel iras,
Marŝas kaj nenion diras,
Ho, silenta noktotrajn'?

La pasantaj ombroj estas
Nur fantomoj de l' memor';
Scenoj el la infaneco,
Revoj de la pasinteco,
Plej proksimaj al la kor'.

Venas pensoj pri la hejmo,
Trans la blua salondar';
Pri la patro kaj patrino,
Kaj la kara amatino,
Kaj fidela amikar'.

Mi revenos, ho, fantomoj!
Baldaŭ kune estos ni;
Nun, dum ombrojn mi rigardas,
Ne mi vin, sed vi min gardas;
Kaj trankvila restas mi.

—"Daĉjo"

★

(El ie en Eŭropo. Soldato Richardson sendis V-poŝte al Elwyn C. Pollock tiun frapante belan originalan poemon. Li havas vere eksterordinaran talenton.)

NOVAJ ĈAPELOJ

DORIS TAPPAN CONNOR

Personaro: Karlo (la edzo, mezaĝa, en simpla vesto); Lilio (la edzino, mezaĝa, frivola).

Necesaj objektoj: Ĉapelujo, en kiu estas virinaj ĉapeloj, unu kovrita per violetoj, la alia per margaritoj.

Scenejo: Verando, aŭ ĉambro de domo. Ĉestas sole Karlo, kiu sidas kaj legas libron, kaj parolas al si mem.

Karlo. Kiajn ĉapelojn la virinoj portas! Kaj la kosto — terure! Ho, jes, virinoj ne havas komprenon pri la elspezo de mono — aŭ pri matematiko. Lilio telefonis al mi ke ŝi intencas iri al la urbo por aĉeti ion, sed—bedaŭrinde—mi timas ke ankaŭ ŝi ne komprenas la matematikon. (Li vidas ke iu venas). Ho, jen ŝi venas! Dio mia! Kion ŝi portas?

Lilio (envenas. Ŝi portas ĉapelujon kaj ekscite komencas paroli). Karlo — mi absolute ne povis rezisti! Mi serĉis ĉapelon. Kiel vi scias, mi havas absolute neniun ĉapelon, decan kaj bonan. Mi serĉis ĉapelon — sed mi trovis du — tre belajn. Tamen, mi ne povis decidi inter ili. Nun, mi kunportis ambaŭ, kaj mi deziras vian opinion!

Karlo. Kiom ili kostas, kara?

Lilio. Ne gravas nun — ne demandu, kara — sed momenton! Mi iras por kombi la harojn. Atendu — nur momenton! (Ŝi eliras).

Karlo. (Dume li prenas la ujon, malfermas ĝin, kaj komencas rigardi). Mi deziras rigardi la prezojn. Nu, ĉapelo kun margaritoj — du dolarojn! Jen, alia — kun violetoj — dek dolarojn! (Li sur-

metas la ĉapelon kovrita per violetoj kaj komencas danci. Li imitas virinan voĉon) Bonan tagon, fraŭlino, ĉu ne estas bela tago... (subite li rimarkas ke la edzino revenas, kaj li rapide remetas la ĉapelon en la ujon). Jen ŝi venas!

Lilo (envenas). Nun — ni decidu. Mi montros al vi. Ambaŭ estas kovritaj per floroj, sed kiun mi pli ŝatas, mi ne scias...

Karlo (subspire). Margaritoj, du dolarojn. Violetoj, dek dolarojn!

Lilio (komencas surmeti ĉapelon). Kion vi diras, Karlo? Ĉu vi ŝatas ĉi tiun — kun la margaritoj? (Surmetas la ĉapelon, faras gestojn, k.t.p.). Aŭ, jen, rigardu tiun — kovrita per violetoj?

Karlo. Kial vi demandas al mi, kara? Sendube, vi jam decidis kiun vi pli ŝatas. Certe ne dependas je mi.

Lilio. Jes, Karlo — mi deziras vian honestan opinion. Kiun vi pli ŝatas?

Karlo. Nu, provu la margaritojn. (Ŝi surmetas ĝin). Nun, la violetojn... la margaritojn de nove... nun, la violetojn, unufoje...

Lilio (fine montras ĉagrenon).

Ne! tio sufiĉas! Sur... de sur... sur... mi estas laca. Kiun vi pli ŝatas?

Karlo. Nu, se vi deziras mian honestan opinionon, absolute... mi preferas... la margaritojn!

Lilio. Ho, ĉu vere? Ĉu ĝi estas la pli taŭga, la pli bela?

Karlo. M-m-m-m-m, nun ni rigardu la koston! (Li rigardas la kvitancon). Nur du dolarojn! Estas bone!

Lilio (kun surprizo). Ho, ne—ne estas. (Ŝi rigardas la du kvitancojn). Kia afero! Ili intermiksas la du kvitancojn! Jen, rigardu — ĝi diras: ĉapelo kun violetoj, du dolarojn... kaj la margaritoj kostas dek dolarojn! (ŝi ree surmetas la margaritojn). Jes, vi havas bonan guston. Mi ankaŭ preferas la margaritojn!

(La edzo preskaŭ svenas, kaj kapo en manoj, eliras).

Friendly Tips for Students:

1. Watch this one! You will notice that in the beginning of our playlet we use the word *ĉeestas* meaning *is present* to indicate who is on stage as the curtain opens. Always remember that in Esperanto we use *ĉeestas la kunvenon* to translate the English *attends the meeting!* The Esperanto word *atendas* means *wait for or await*. *Mi atendas vin ĉe la domo.* (I will wait for you at the house).
2. Today's Special: — The little word *jen* is a useful and common exclamation in Esperanto, meaning in the examples given: *Ho, jen ŝi venas!* (Oh, here she comes!) *Here* used in the sense of surprise. — *Jen alia!* (Here! Is another!) The same sense of surprise. — *Aŭ, jen, rigardu tiun!* (Or, see, look at that one! Thus calling one's attention forcefully to something.
3. One last point: — Did you notice the "n", accusative, on the prices quoted? *Du dolarojn. Dek dolarojn. Ĝi kostas dek dolarojn.* This shows one of the uses of the accusative in Esperanto: Accusative of price. We also have the accusative of time, of weight and of measure, — all used in exactly the same way.

VIVAT, CRESCAT, FLOREAT, SECRETARIAT

The secretarial and promotion work connected with the *American Esperantist* grows heavier — as memberships, subscriptions and opportunities for public relations increase. The AE Staff takes this occasion to mention some of the helpers who have greatly lightened the load. We plan an organized Secretariat in the near future, in the meantime the following are among those who serve valiantly:

Mary Marrett, professional secreta-

ry gives unstintingly; *Vesta Spant*, increasingly devotes time to the work; *Pierce Elsasser*, perfect translation; *William Vathis*, Assistant Editor Club News; *Manoog Marootian*, Art Director; *Fritz Ublig*, constructive counsel; *Mabel Vicary*, Assistant; *Victor Murray* and *Sarah Glauberman*.

For active promotion, of a very high order, special mention must be given to *Commander and Mrs. Richard E. Lambert*.

Rimletero al "Amerika Esperantisto"

Mia kara redaktoro,
Mi gratulas vin el koro.
La gazeto estas bela,
La enhavo tre fabela.
Nun alvenos la abonoj:
Centoj, miloj, milionoj.
Aŭ ĉu tion mi nur revas?
Propagandi ni nun devas.
Ĉiuj sekvu vian peton:
Ili montru la gazeton
Al najbaro, amikino,
Samklubano, bopatrino.
Bibliotekojn enlistigu
Kaj vendejojn tuj instigu:
Ĉiuj devas vendi, vendi,
Centojn da abonoj mendi.

Tiel kreskos la movado
Kaj turniĝos ĉiu rado.
Urgas tempo. Propagando
Estas grava en la lando.
Ĉie sonu nia kanto
Pri la lingvo Esperanto.
Mi ĝin diras aĉe, plaĉe,
Facilstile kaj rimaĉe.
Vi ne perdu la humoron,
Sed daŭrigu la laboron.
Mi nun restas kun gratulo
Kaj salut'

Babi le Mulo.

★

(El diversaj landoj venas laŭdoj pri AE.
Supre estas unika ekzemplo en rimo.)

NIAJ VIZAĜOJ RUĜIĜAS!

"I wish to congratulate you on the type of AE . . . under your editorship . . . It is especially deserving of credit . . . these war-time years."—*Noted Doctor, Illinois.*

"Ŝajnas ke post longa klopodado ni denove posedas taŭgan ĵurnalon."—*En la militŝiparo, Florido.*

"I congratulate you on the recent numbers of AE . . . It is becoming rapidly a more impressive and useful production, and losing the dilettantism of former times . . . The improved AE should be a powerful help . . ."—*Eminent British Esperantist, England.*

". . . now we have an editor who realizes that AE is published for one reason and only one — to advance Esperanto. In that cause alone can all Esperantists unite.—*Discerning Esperantist, Michigan.*

"Ĝi ja enhavas novaĵon de la tuta Esperantujo."—*Esperantisto, Kanado.*

"Mi volas gratuli vin speciale pro ĝia neŭtraleco kiun mi ŝatas multege."—*Viktorio, Aŭstralio.*

"I enjoy the magazine exceedingly and wish to compliment you on its neat form and interesting contents."—*Navy Miss, Canal Zone.*

"Vivat, crescat, floreat, *American Esperantist* and its Editor!"—*College Professor, Ohio.*

LIMERIKOJ

Georgo Alano Konoro,
Esperantistredaktoro,
Kun lia edzino
Kaj Knight Sinjorino
Kaj Solzbacher, fama doktoro.

Mi tiun gazeton adoras,
Kaj ridas, kriegas kaj ploras,
La skribojn legante,
Neniam timante,
Sed ĉiam la tuton favoras.

— *James H. Furay*

Detroit raportas viglan agadon en tiu urbo. En 1944 estis nur du anoj de IEL en la urbo, sed ĉi-jare jam aliĝis ok personoj, inkluzive de unu membro-subtenanto kaj unu patrono. *Esperanto-Societo de Detroit* subtenis la 10-an Brazilan Kongreson de Esperanto per aliĝo kiel subtenanto. Kvar personoj plue aliĝis kiel simplaj membroj. Ili kolektis sumon de \$33, ESD aldonis \$30, kaj per tiu \$63 ili aĉetis kaj donacis al diversaj bibliotekoj pli ol dek apartajn librojn. Kiu grupo povas konkuri kun ESD?

★

Saluton el Argentino tenis tre malfrue, sed la vortoj estas same belaj: "Okaze de Novjaro mi salutas tutkore al ĉiuj usonaj gesamideanoj, dezirante al ili grandan progreson . . . D-ro J. A. Quina Gonzalez, Argentina Esperantista Katolika Asocio, Buenos Aires."

★

Petskribo al San Francisco en du lingvoj, Esperante kaj Angle, estis la klopodo de la Esperanto-Societo de Filadelfio (Philadelphia). Sub la direkto de S-ro H. S. Smith la petskribo estis presita, kaj S-ro Smith intencas disdoni ĝin kiam li ĉeestas la Konferencon en San Francisco.

★

"*Kiu estas Kiu* inter Usonaj Esperantistoj", aranĝita de F. A. Post, estas preta por disvendado. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 150 adresojn kun biografiaj skizoj de Esperantistoj. La teksto estas presita paralele en la Esperanta kaj la Angla lingvoj. La prezo de la libro estas unu dolaro. *Amerika Esperantisto* esperas recenzi ĝin en la sekvonta numero.

★

Esperantista trombonisto estas Elwyn C. Pollock, kiu nun muzikas ĉe "Earl Carroll's Theatre Restaurant" en Hollywood, kaj ĉe la "Philco Hall of Fame" radio-dissendo kun Paul White-man!

Frank Martin de Bostono multe kaj konstante propagandas por Esperanto en diversaj rondoj: instruistoj, pastroj, ĉe la Ruĝa Kruco. Kiel la plej facila maniero por respondi al la demando, "Kiel ĝi sonas?", li utiligas la unuajn frazojn en la Biblio: "En la komenco Dio kreis..."

★

Novajo el Kanado, venas de *Fino Doris Saville* en Vancouver: La *Vancouver Esperanto Group* daŭrigas kunvenojn, kun kurso, merkrede ĉe la Vancouver Business School. La estro de la Komerca Lernejo estas S-ro W. H. Fenton, kiu ĵus aliĝis al EANA. Alia nova ano por la Asocio estas D-ro P. L. Prasley, Konsulta Inĝeniero ĉe Montrealo. Ni bonvenigas ilin kore!

★

Nova reprezentanto de Esperanto inter la maristoj estas S-ro George Falgier de St. Louis, Mo., kiu aliĝis pasintan monaton. Ni sentas lian mankon, sed ni aplaudas lian deziron servi lian Landon!

★

Gratulon al lerta tradukisto, kiu estas neniu alia ol nia samideano, Pierce Elsasser, kiu tre zorge kaj lerte tradukas Esperante. Li nun helpas al S-ro Roland Ruff pri lia traduko de la broŝuro "Pri Okcidenta Virginio". S-ro Ruff skribis ke ĝis nun li ricevis nur kelkajn petojn pri la broŝuro, kaj konsilis ke pli kaj pli da Esperantistoj skribu al li, se ili deziras kopion. Enmetu tri-cendan poŝtmarkon, kaj sendu al *Roland Ruff, Route 2, Box 233, Saint Albans, W. Va.*

★

Esperantista meteorologiisto estas Leŭtenanto J. W. Wood, kiu nun deĵoras en Kalifornio, en la Armea Flug-Servo. Antaŭe li estis en la ŝtato Tekso (Texas), kaj allogis lin al Esperanto S-ro F. A. Post en Arkanso (Arkansas). Leŭt. Wood bone subtenas Esperanton per abonoj por Bibliotekoj.

General Publicity Fund

The first steps have been taken in the new General Publicity Campaign to bring home to the people of the United States and their leaders the fact that Esperanto is the only, living functioning interlanguage in the world today! We are already beginning to see some excellent results, which we will report to you in the next issue. Meanwhile, won't you take part in this important endeavor? We shall need funds, and more funds, in order to keep Esperanto before the public eye! Send in your contribution now. Every little bit helps! If a hundred people send in only \$1.00 each, think how it adds up. The English Esperantists contributed over \$3,000 to their Advertising Fund last year! Surely, we in the United States can try to do as well! We take this opportunity to thank the following for contributions: Mrs. D. B. Fuller, \$3; Dr. John Osenbaugh, \$5; Dr. G. P. Ferree, \$10; C. H. McKinney, \$1.50; Wm. H. Donaldson, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Wm. M. White, George B. Wren, each \$1.00

★

Magazines on Esperanto

The following magazine numbers recommended to all Esperantists active in promotion work. Showing them or giving them away should in many cases prove very effective. Order from the "American Esperantist".

Vital Speeches, Special issue on San Francisco Conference, containing article by Dr. W. Solzbacher (as printed in AE) on "Common Language for World Organization" 20 cents

Saturday Review of Literature, Symposium on the world language problem, including article by G. Alan Connor on "A 'Neutral' Tongue", 15c.

The Pan American, Containing article by Doris Tappan on "Esperanto — Bridge to Solidarity" 25 cents

DEZIRAS KORESPONDI

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 25 cendojn por 4 linioj. El aliaj landoj, de kie estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncojn senpage. La redaktisto rezervas al si la rajton fini tiun privilegion je iu tempo.

Speciala noto: Laŭ sugesto de Prezidanto Stockard, AE publikigos anoncetojn de eksterlandaj skoltoj senpage.

Argentino. Argentina Esperantista Katolika Asocio, Bartolome Mitre 1524, Buenos Aires, havas 60 lernantojn en Esp-o kurso. Interŝ. gazetojn, kor. pri kulturaj temoj.

Argentino. Jose Bayon Sebastia, Humberto 1, No. 747, Cordoba, dez. kor.

Anglujo. Derrick P. Faux, The Bungalow, New Drive, Painswick, Glos., dez. kor. kun Baha'i Esperantistoj. 19-jara.

Francujo. M. Eng Diendegard, 5 rue de Bapeaume, Maromme (S. Inf.) gvidas Esperanto-kurson kaj dez. korespondantojn por la grupo.

Francujo. S-ro Leon Wojciechowski, 351 Cité Bruno, Dourges, Pas-de-Calais; 27j. ministro, francigita polo. perdis Espo-materialon kiam la policc arestis lin en 1944, dez. kor.

Nov-Zelando. Clifford H. Brown 10 Chancery Lane, Christchurch, Canterbury, dez. kor. Interesas pri interŝ. de gazetoj, PM; 33-jara, ŝatas "Swing" muzikon!

Usono. S-ro John W. Jeffers, Los Banos, California, 27-jara, dez. kor. kur geesperantistoj tutmondaj pri diversa temoj.

Usono. S-ro Fojak, 236½ N. New Hampshire, Hollywood, Cal., dez. kor. kun iuaĝuloj sciencfikciemaj, kaj ju nulinoj entuziasmaj pri la kino, e landoj ne angla-lingvaj.

Irlando. (Eire). F-ino J. M. Den vir, The European Hotel, Cobl (Queenstown), Co. Cork, dez. kor.

ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

- PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction .75c
- ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps .25c
- PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations .25c
- UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages \$3.50
- AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion .30c
- ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid *key*, with grammar, and considerable fundamental teaching .10c
- "LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8x11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings .15c or 2 for .25c
- "LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation. .10c or 3 for .25c
- EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages \$1.00
- STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best. Paper covers .75c
- DICTIONARIES. Just received, Millidge \$3.50, Fulcher & Long \$2.50
- STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.
- INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center .45c
- HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.
- "LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto) \$1.25
- "ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns .45c

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist". \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships. Total for all above, \$4.00.

I..... Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount)

.....

.....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

Esperanto is the living 'general language' created for interchange of thought between peoples of different national languages — not to take the place of their mother tongues.

With reference to Esperanto as "General Language" (see editorial page in this issue), consider the experience of Mr. J. T. Harrod, Headmaster of Sibford School, Banbury, England. He writes: "I have taught Esperanto for about seven years, but only to beginners, aged 11 to 13 years. Esperanto begins by awakening an interest in language as such. Then follows the acquisition of a standpoint outside of English, from which the mother tongue can be studied objectively. . . .At the same time the grammatical meaning of inflection and concord is growing subconsciously — an excellent preparation for other language study."

"Then comes a realization that Esperanto can be used for foreign correspondence. If this opportunity is afforded, an intense international interest is evolved, geography becomes more real, and a world-sense appears prominent in the child mind. This is accompanied by a recognition of the great possibilities of Esperanto, and a desire to use it well."

"As a subject of study, Esperanto has a disciplinary value little, if any at all, inferior to that of Latin. It is an unusually attractive language, on account of its ease, clearness, and beauty; it has proved especially interesting to people of a mathematical or scientific turn of mind, who would not otherwise be fascinated by linguistic studies."